

BRAZILA ESPERANTISTO

64-a Jaro


JULIO-SEPTEMBRO 1970

N.º 676-678

Oficiala organo de **Brazila Esperanto-Ligo**, Societo de publika utileco (dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921). Jarabono eksterlande: 15 respondkuponoj.

Sidejo: **Praça da República, 54, 2.º** — Telefono: 242-4357 — RIO DE JANEIRO — BRAZIL
Respondeca redaktoro (redactor principal): **D-ro Carlos Domingues**

VITÓRIA — ESPÍRITO SANTO



Vido, el alte, de la plurjarcenta monaĥejo sur la "Penha" (Roko), monumento de religia kredo, proksima de Vitória. En Vitória gvidas la E-Movadon agema societo — Associação Capixaba de Esperanto.

KONVERSACIO (I)

OMNIBUSVOJAĜO

- Bonvolu: kiu estas la horaro por Rio?
- La unua omnibuso je la 6-a; la aliaj je ĉiu dua horo.
- Kiom estas la tempodaŭro de la vojaĝo?
- Dek horoj.
- Kaj la veturpago?
- Dudek kruzejoj kaj dek kvin centavoj.
- Mi volas du biletojn por la proksima veturo.
- Sur kiu vico vi preferas?
- En la mezo, ĉe la sensuna flanko.
- Kvardek kruzejojn kaj kvindek centavojn.
- Jen.
- La troaĵo.
- Dankon.

- De kiu kajo forveturos la omnibuso al Rio?
- Kajo M.
- Ĉi tiun pakajon mi povos kunporti; ĉu ne?
- La kofron en la pakajujo kaj la valizon sur la breto.
- Mi liveras la kofron al vi?
- Jen via markbileto.
- Do ĉio en ordo?
- Bonan vojaĝon.

- Ĉu ankoraŭ daŭros longe por la alveno?
- Post unu horo ni estos en Rio.

G. P.

SVEDAJ ELDONJOJ

	Cr\$
Ekspedico Kon-Tiki, vojaĝo ..	28 00
La Granda Aventuro, Szilágyi, noveloj	10,00
Islandaj Pravoĉoj, 3 rak., 1 poemo	9,00
La Konscienco Riproĉas, Strindberg, romano	3,00

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(De acôrdo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brasila Esperantisto"	15,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	40,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	60,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	90,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vèzes a quota dêste.	
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vèzes a quota dêste.	

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

Inter Sudo kaj Nordo, Szilágyi, noveloj	13,00
Pasko, Strindberg, teatro	3,00
Enketo pri Internacia Helplingvo	3,00
Ŝipestro Rakontas, aventuroj	8,00
El la Vivo de L. Zamenhof, legolibreto	4,00
Kredo al Dio en la Atomepoko, evangelia	7,00
Jaroj Sur Tero, memoroj de L. Sinha	18,00
Kvara Rapsodio, Szilágyi, antologieto	4,00
Konstruteknik Terminaro, Sv.-E; E.-Sv kaj aliaj	11,00
Sveda Antologio, broŝ	30,00
bind	35,00
Malsata ŝtono, Tagore, rakontoj	24,00
Vivo Vokas, Engholm, romano	10,00

HA LO! ĜENERALA VOKO!

Kontribue al gratulinda laboro de niaj radioamatoroj, kiuj diskonigas, familiarigas kaj admirigas la Lingvon Internacian per la plej efika rimedo, mi prenas la liberon atentigi ilin:

a. UEA duonoficialigis (Jarlibro 1968, pĝ 168) Literuman Alfabeton por Esperanto: asfalto, barbaro, centimetro, ĉefo, doktoro, elemento, fabriko, gumo, ĝirafo, hotelo, ĥaoso, insekto, jubileo, ĵurnalo, kilogramo, legendo, maŝino, naturo, omnibuso, papero, rekordo, salato, ŝilingo, triumfo, universo, universo-hoko, vulkano, zinko. Aldone: kuo, ĝermanavo, ikso, ipsilono. Sur paĝo 192 aperas la morskodaj signaloj por la supersignitaj literoj.

b. OTAN ŝanĝis la anglan literuman alfabeton por faciligi la adapton al latinidaj lingvoj; estas facile etendi tion al Esperanto: alfo, bravo, cento,

ĉefo, delto, eĥo, fokstroto, golfo, ĝojo, hotelo, ĥaoso, indio, julio, ĵuro, kilogramo, limo, mikaelo, novembro, Oskaro, papo, kuo, Romeo, seĝo, ŝako, tango, uniformo, uniformo-hoko, Viktoro, ĝermanavo, ikso, ipsilono, zuluo.

c. La uzado de geografiaj nomoj por literumi voksignalojn tute ne konvenas por Esperanto: la troa ripetado de sufiksoj estas terure malbela kaj konfuziga.

ĉ. En malnova numero de "Esperanto" (UEA) troviĝas modelo por la karto de Raporto pri Ricevo (QSL).

d. La "Radio-Terminaro" de A. Venture, eldonita de Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado estas sufiĉe bona, kvankam nekompleta.

Kun streĉa 73

Geraldo Pádua — PY4 BBT

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO:

Direção do Movimento Esperantista no Brasil

Propaganda do Brasil no exterior

Cursos em classe e por correspondência

Diplomas da Academia de Esperanto

Congressos Brasileiros de Esperanto

Revista "Brazila Esperantisto"

Serviço de Livros

Biblioteca

Aperfeiçoe o seu Conhecimento

...“Comecei, então, a evitar traduções literais, pensando diretamente na língua neutra. Daí por diante, senti que, em minhas mãos, ela deixava de ser mera sombra, sem base, dêste ou daquele idioma, com que eu lidava no momento; agora possuía espírito próprio, vida própria, fisionomia bem definida e claramente expressa, livre de quaisquer influências”.

Zamenhof

Traduza o trecho abaixo e aguarde o próximo número da revista, para confrontar seu trabalho com nossa tradução Colha ensinamentos, estudando os pontos de divergência.

OLHOS BAIXOS

Dinah Silveira de Queiroz

... A filha estava noiva! Era o noivo moço de posses, tinha uma oficina... Pouco antes do casamento, a jovem estava em minha casa.

— “Então, você está contente?” — perguntei.

A mocinha baixou a cabeça.

— “Ora se está!” — disse a mãe. “Que é que pode querer mais? O Presidente?”

Correu o mês. Casou a filha da lavadeira. Contaram-me que o noivo não poupou despesas. Fêz até correr vinho francês. Houve, porém, quem ouvisse a noiva resmungar:

— “Mal empregado... tudo isto!”

— “Mal empregado por quê? Você merece!”

A noiva não riu.

Foi o casal para o apartamento no-vinho em fôlha. A mãe dava notícias da menina.

— “Está estragada com tanto mimmo!”

Um dia a lavadeira entrou em casa, os olhos inchados e vermelhos:

— “Ai Jesus! A filha fugiu!”

Dez dias depois de casada a pequena fugira.

Houve logo um amigo que avisou ao marido:

— “Foi com o português...”

Sim, ela fugira com o homem casado — essa menina a quem o marido

INTERNACIA ABOCOLIBRO-BIBLIOTEKO

Nia samideano Prof. Benedicto Silva, el Monte Aprazível, São Paulo, kun la celo kolekti plej grandan nombron da abocolibro uzataj en kiel eble plej multaj landoj en la tuta mondo, fondis Internacian Abocolibro-Bibliotekon. Ties materialo estos uzata de li kaj aliaj instruistoj, por kompara studo de la instrumentadoj uzataj en la tuta mondo. La kolektadon de abocolibro li faras jam de antaŭ 7-8 jaroj, kaj li jam sukcesis ricevi de esperantistoj (ekskluzive de esperantistoj!) entute 62 volumojn en 30 lingvoj, el 35 landoj!

Per tiu biblioteko li sukcesas ankaŭ propagandi nian Internacian Lingvon pere de neesperantistaj kleruloj. Baldaŭ li aranĝos publikan ekspozicion pri tiu materialo, kaj tiam li reliefigos la gravam rolon de Esperanto en kulturaj movadoj.

LIBROSERVO

	Cr\$
Aktoj de la Akademio	10,00
Jamborea Lingvo	6,00
Multiplika Tabelaro	2,00
Historio de la Mondolingvo, Drezen	24,00
Arabaj Maksimoj	8,00
Esp.Eng., Eng.-Esp. Dict. Wells	8,50
Paŝoj al Plena Posedo	16,00
Parnasa Gvidlibro	14,00
Arĉoj, poezio, G. Mattos	11,00
Infana Raso, poez., W. Aud, 2-a eld.	11,00

tratava como se fôsse uma rainha. E a lavadeira chorava convulsivamente:

— “Foi tudo plano! Com dezesseis anos não era dona de sua vontade. Casou. Fêz-se senhora de si e agora vai morar com quem entender. Isso de leis de maioridade! Olhe que às vezes tenho ganas de as vomitar! O tal do sem-vergonha consentou tudo com minha filha. Casar com outro, só para poder fugir com êle!”

Brazila Kroniko

PIAUI

Curimatá — S-ro Samuel Dourado Guerra, kiu rekomencis sian aktivecon, gvidas elementan kurson de Esperanto por gimnazianoj, al kiuj li instruas samtempe la lingvojn portugalan, francan kaj anglan.

BAHIA

Salvador — De la monato Marto, Bahia Esperanto-Asocio havas novan estraron por la periodo 70-71: Prez. D-ro José Siquara da Rocha, Vicprez. S-ro Edson G. Pedra, 1-a Sek. Prof. Godofredo de A. Goes, 2-a S-ino Maria da Conceição C. Leal, 1-a Kas. S-ro A. Claudiano Carvalho, 2-a P-ino Suzete Maria F. Dias, Kons. D-ro Jaddo C. Maciel, Prof. Leopoldo H. Knoedt, Prof. Onias Almeida.

— Celante doni al Esperanto pli grandan disvastigon la nova prez danto de B.E.A., D-ro J. Siquara da Rocha kun aliaj samideanoj ofte vizitadas plurajn mezgradajn lernejojn kaj kulturajn instituciojn kie li trafe kaj brile prelegas. Tiajn prelegojn li jam faris en 25 lernejoj, inter kiuj la Kolegioj Manuel Devoto, Marista, Costa e Silva, Instituto Feminino da Bahia, Escola de Aplicação da Faculdade Católica de Filozofia ktp. En tiuj lokoj D-ro Siquara entuziasme deklamas kaj kantas kaj en la kantado estas akompanata de la ĉeestantoj. Grava atingo estas, ke li sukcesis altiri la kunlaboron de la diversaj generacioj. Tiel maljunaj veteranoj ĉirkaŭas kaj apogas lin. B.E.A. feste kunvenis en la 15-a de Aprilo. La gazetoj de la urbo raportas pri ĉiuj aktivecoj.

MINAS GERAIS

Sete Lagoas — Nia malnova samideano D-ro Wilson Veado, fondinto kaj direktoro de Fakultato de Filozofio Sciencoj kaj Beletristiko, sukcesis havigi la aprobon de la Prezidanto de la Respubliko por tiu Fakultato, en kiu Esperanto estas deviga lernobjekto de la Beletristika Kurso. D-ro Veado deziras la kunlaboron de niaj samideanoj

per la donaco de Esperantaj libroj por la biblioteko de la fakultato.

ESPÍRITO SANTO

Vitória — Kiel instruisto en Colégio São Vicente de Paulo, Prof. Gilson Villas Boas Passos fondis societon nomatan Esperanto-Klubo Prof. Aristóbulo Barbosa Leal, omaĝe al la lernejestro de la dirita kolegio, granda admiranto de la Internacia Lingvo. Ĉiuj membroj estas ankaŭ membroj de Associação Capixaba de Esperanto kaj de B.E.L. La himno de la kolegio estas afable tradukita esperanten de nia konata poeto Leopoldo H. Knoedt. Originalon kaj tradukon de tiu himno ni aperigas en alian lokon.

— A Gazeta, la plej grava ĵurnalo en la Stato, aperigas serion da interesaj artikoloj pri Esperanto, verkitaĵ de S-ro Paulino J. Moraes. S-ro Moraes, kiu estas kronikisto de tiu gazeto, vere entuziasmiĝis pri la Internacia Lingvo, influita de nia eminenta samideano D-ro José Paulino Alves Jr.

RIO DE JANEIRO

Nova Iguaçu — S-ro Adail Cardoso Barbosa malfermis en la 6-a de Junio Elementan Kurson de Esperanto ĉe Tattiva Swami Brahmananda (adreso: R. Itapicuru s/n), kiu destiniĝas al la membroj kaj al la ĝenerala publiko. Enskribiĝis 12 lernantoj.

SÃO PAULO

São Paulo — Diário Popular publikigas kurson de Esperanto verkitan de Prof. Walter Francini. Krom la lecionoj la kurso prezentas la Universalan Deklaracion Pri La Homaj Rajtoj en du paralelaj tekstoj — portugala kaj Esperanta — kaj informojn pri Unuigintaj Nacioj kaj Esperanto-Movado.

— Al gekomencantoj S-ro Carlos Prates Castanho instruas Esperanton ĉe Casa Transitoria (F.E.E.S.P.) en Belenzinho.

Itapeva — La ĵurnalo Folha do Sul komencis publikigi, en la 11-a de Aprilo E-kurson sub la orientado de Profesoroj Elvira Fontes, Arnaldo Viana kaj Walter Francini, de São Paulo Esperanto-Asocio. La kurso aperas pro la aga-

do de nia sindona samideano Francisco Panis, kiu ankaŭ aperigas en la saman gazeton malgrandajn notojn en Esperanto.

São José dos Campos — La ĵurnalo *O Valeparaibano* informas la 8-an de Aprilo pri E-ekspozicio en la Libroven-dejo Demartini, kiun organizis Majoro Gilberto A. Silva Velho el Caçapava kun la kunlaboro de S-ro Miguel Rodrigues.

— La sama gazeto, en sia numero de la 14-a de Aprilo, aperigas longan artikolon omaĝe al Zamenhof kaj memorige de lia morto.

PARANA

Curitiba — Paraná Esperanto-Asocio elektis en la 19-a de Aprilo la estraron por 1970-72: Honora Prez. S-ro Augusto G. de Castro, Prez. S-ro Gert Drucker, Viceprez. D-ro F. J. Soares Portugal, 1-a Sek. S-ro Leonidas Silva, 2-a S-ro Hermanito O. Christensen, Kas. S-ino Natalina R. da Silva, Bibl. S-ro J. Cabral dos Santos, Oratoro Prof. Geraldo Matos.

— En la Internacia Tago por la Forigo de la Rasa Diskriminacio la 21-an de Marto, Paraná E. A. okazigis solenan kunvenon en sia sidejo. Parolis diversej oratoroj kaj la ĥoro de L.B.V. kantis la himnon *La Espero* kaj Esperantajn kantaĵojn. TV-Paraná Kanalo 6 televidis la solenon, pri kiu la lokaj gazetoj raportis. Oni uzis la okazon por doni informojn pri Esperanto.

RIO GRANDE DO SUL

Porto Alegre — La ĵurnalo *Correio do Povo*, en sia numero de la 12-a de Majo, aperigas artikolon sub la titolo *Vocação Brasileira* (Brazila Emo) en kiu D-ro M. Belmonte de Abreu, analizante la paroladon faritan de la Prezidanto de la Respubliko, Generalo Emílio Garrastazu Médici, en la Tago de la Diplomato, reliefigas la gravan rolon de Esperanto en la internaciaj rilatoj pro ĝia perfekta neŭtraleco.

SCIENCA LIBRO

El la Polvo de la Tero Prezo Cr\$ 13,50

NEKROLOGO



JORGE DE SALDANHA CARREIRA

En la 7-a de Februaro lasta forpasis pro aŭtomobila akcidento nia eminenta samideano Saldanha Carreira, kiu estis dum multaj jaroj la personigo de Esperanto en Portugalujo. Lerninte la lingvon en 1913, li klopodis disvastigi ĝin eĉ en militaj tranĉeoj.

Li estis unu el la fondintoj de Portugalula Esperanto-Asocio, de 1932 ĝis 1949 ĉefdelegito de U.E.A., iama membro de la Lingva Komitato kaj poste de la Akademio, kaj kunaŭtoro de konata lernolibro "Curso Elementar de Esperanto". La Komitato de U.E.A. en 1951 nomis lin Honora Membro. Li gvidis multajn kursojn inkluzive en la Lisbona Radio-Stacio (1932) kaj estis kunlaboranto de "Enciklopedio de Esperanto". Ĉiujn Esperantajn librojn de sia riĉa biblioteko li postlasis al U.E.A.

Saldanha Carreira havis grandan estimon por la Brazilia Movado kaj multe kunlaboris kun B.E.L., speciale por la disvendado de niaj libroj ĉefe de *Dicionário Português-Esperanto*, kiun li larĝe enkondukis en Portugalujon kiel nia reprezentanto. En la lasta tempo, kuniginte en du volumojn siajn artikolojn kvazaŭ en memorlibron, li faris du kopiojn: unu por B.E.L. kaj la alian por la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

Persona amiko de Saldanha Carreira estis nia prezidanto D-ro Carlos Domingues, kiu lin vizitadis hejme, kiam li troviĝis en Lisbono.

Sincere ni kondolencas la familion de nia kara amiko kaj niajn portugaliajn samideanojn.

ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

ALEMANHA — Foi inaugurada em Karlsruhe moderna ponte à qual foi dado o nome *Esperanto*. É, ao que se sabe, a primeira ponte com tal nome, que, de resto, é bem apropriado: o Esperanto é bem uma língua-ponte para o tráfego de idéias entre pessoas de línguas diferentes.

ESPANHA — Realizou-se em Barcelona o 11.º Concurso "Comella-Bassols", tendo conquistado o 1.º lugar o Sr. Teo Jung, da Holanda, com a composição "*Beninda Infaneco*". Em segundo lugar colocou-se o Dr. Jan Filip, da Checoslováquia, que concorreu com *Kiu Ridas la Lasta*. Participaram do júri Amália Nuñez Dubús, N. H. C. Macpherson, Gabriel Mora Arana e Francisco Vilá.

ESTADOS UNIDOS — A oeste da cidade de Massachusetts teve início em Janeiro um curso de Esperanto pela Televisão, a cargo do professor John Lewine. O programa é transmitido em cadeia para cinco comunidades. A aprovação em exame valerá para os espectadores pontos para os cursos colegiais.

William Auld, escritor e poeta inglês, foi nomeado para dirigir o curso oficial de Esperanto, que terá início em Julho próximo, no *San Francisco State College*, da cidade de São Francisco. O curso será dividido em duas séries.

FRANÇA — A Universidade de Clermont-Ferrand adotou o ensino do Esperanto na Faculdade de Filosofia e Filologia. É matéria facultativa na 1.ª série dos cursos existentes.

FINLÂNDIA — A empresa de aviação "Finnair" editou em Esperanto uma brochura sobre as saunas finlandesas. Trata-se de importante prospecto de turismo e viagem.

HOLANDA — O Museu Bíblico de Antigüidades (Hemonylaan, Amsterdam 1008), o mais completo museu arqueológico que se conhece, acaba de editar um prospecto-programa de suas atividades. Para as visitas há guias que explicam em francês, alemão, inglês e Esperanto.

A. Mazzolini

EKZERCILO-HELPILO

Por Supera Praktik Kurso
de Esperanto - 2 vol. . . Cr\$ 9,00

MONDMAPO

98 X 70 cm — Kolorigita

Laŭ la decidoj de Internacia
Komisiono por Ordigo de
Geografiaj Nomoj . . . Cr\$ 9,00

ITÁLIA — Aos domingos, na Basílica de Santa Maria Maggiore, o Padre G. Jacobitte está celebrando missa em Esperanto. Após o ofício, os fiéis, que o queiram reunem-se no Centro Católico de Esperanto de Roma, junto ao Instituto Pontifício para Estudos Orientais.

NORUEGA — Depois do êxito alcançado pelo primeiro filme documentário turístico sobre a capital norueguesa falado em Esperanto, a Sociedade de Tráfego e Turismo daquela cidade produziu uma segunda película que ilustra as características sociais, artísticas e naturais de Oslo. Diversos países, entre os quais a Austrália, Nova Zelândia, França e Alemanha, já editaram filmes em Esperanto com pleno êxito.

POLÔNIA — Um grupo de parlamentares estrangeiros em visita à Polônia interessou-se pela evolução do ensino do Esperanto naquele país. Representantes do Ministério da Educação receberam os visitantes com informações sobre o programa de ensino do idioma em 91 escolas polonêsas.

INTERNACIONAL — A professora G. Harabagiu, da Califórnia, empreendeu interessante experiência, dirigindo cursos de Esperanto em suas viagens pelo Pacífico e Atlântico. Os cursos se realizaram a bordo dos navios "Donizetti" e "Iberia".

RECENZO

Marta, de Eliza Orzesko. Rakonto. El la pola literaturo tradukis L. L. Zamenhof. Editions Françaises de Esperanto, Marmande, 1968, 213 p., 19,5 x 13cm. Prezo en la libro-servo de B.E.L. Cr\$ 22,00

Kun ĝojo ni vidas reeldonita plian verkon en traduko de Zamenhof. Kiel la unua eldono la dua ne enhavas antaŭparolon, eĉ enkondukon aŭ prezenton.

En la pola literaturo *Marta* ne estas elstara verko, sed en Esperanto ĝi fariĝis klasikaĵo pro la traduko de Zamenhof.

Plian fojon ni povas admiri la gemon de Zamenhof pere de sintakso vere internacia, modelaj pretaj frazoj kaj novaj vortoj elektitaj laŭ severa kriterio.

Ja Zamenhof, kiel kreinto de Esperanto, ne kreis propre dirite neologismojn, sed enkondukis novajn vor-

tojn post longa meditado kiel li mem iam konfesis.

Bedaŭrinde hodiaŭ kelkaj kompetentaj esperantistoj, kiuj multe lernis de li, konsideras liajn tekstojn arkajaj aŭ eksmodaj. Al tiuj, kiuj ne same pensas, ni rekomendas la legadon aŭ relegadon de *Marta*, ĉar ĝi — kiel cetero ciuj liaj verkoj — estas neelĉerpbla fonto de lingvinstruo.

L.A.M.

KATALOGO DE ELEKTITAJ LIBROJ EN ESPERANTO

Livro ilustrado, interessante para leitura e muito próprio para presente e propaganda.

Documento valioso para prova da vitalidade do Esperanto e de sua literatura Cr\$ 3,50

O LIVRO E A PENA

Hino do Colégio São Vicente de Paulo

Letra do Prof. Aristóbulo Barbosa Leão

Música de Carlos Vianna Cruz

Sob o teto do Colégio,
Nobre templo do Saber,
Empunhando o LIVRO e a PENA { bis
Nós havemos de vencer. }

Salve, ó LIVRO, "audaz guerreiro!"
Salve, PENA, arma de luz!
Sois a força que, nos prélios, { bis
A vitória nos conduz. }

Eia, avante, vicentinos!
Marchai na linha de frente,
Porfiando em dar, unidos, { bis
Honra e glória ao São Vicente! }

ESTRIBILHO

Mocidade, ergue bem alto
O teu pendão alvi-anil!
Abre o LIVRO e toma a PENA!
Vai lutar pelo Brasil!

LA LIBRO KAJ LA PLUMO

Himno de la Lernejo Sanvinĉento de Paŭlo

Teksto: Prof. Aristóbulo Barbosa Leão
Muziko: Carlos Vianna Cruz

Sub la tego de l' Lernejo,
nobla templo de la Sci'
en la manoj PLUM' kaj LIBRO { bis
nepre venki devos ni. }

Gloron! LIBRO, bravmilita!
Gloron! PLUMO, lumarmil'!
Fortoj, kiuj bataloj { bis
gvidas nin al venkoj mil. }

Nu, antaŭen, vinĉentanoj!
Marŝu en la frontacmento,
unueco via iĝu { bis
glor', honor' por Sanvinĉento! }

REFRENO

Junular', la flagon levu
blankan-bluan por armil'!
Prenu LIBRON, prenu PLUMON!
ek al lukto por Brazil'!

Esperantigis Leopoldo H. Knoedt